daŭras la naskado, sed ĉesas la pereo, tion oni spertis kun la kunikloj en Aŭstralio. La kuniklo en Aŭstralio, tamen, havas unu tre danĝeran malamikon: la homo. Sed kiam la homo estos en pozicio simila al tiu de la kunikloj en Aŭstralio, kiun malamikon havos li, se li plu kaj plu multigados sin sur tero? Estas nepre klare, ke tiu procezo ne povos daŭri. La kreskokurbo de la homaro similos al ĉiuj aliaj kreskokurboj, kaj fine ĝi asimptote proksimiĝos al ia maksimumo — almenaŭ se la sorĉlernanto per siaj atombomboj ktp. ne kaŭzos tian katastrofon, kia neniigas kaj atingaĵojn kaj eblojn. La grava demando ĉe tio estas nur: kio finfine limigos nian nombron: ĉu nia prudento, kiu instruas nin, ke ni devas ne kunikle multigi nin, se ni ne pereu kunikle? Aŭ ĉu nia malprudento, kiu en tiu ĉi kazo kutimas sin vesti per la mantelo de la moralo, nia malprudento, laŭ kiu ni daŭrigas multigi nin kunikle, lasante al la providenco restarigi la ekvilibron kiun ni perturbis? Ne dubu: la providenco nepre tion faros. Se ni ne libervole kaj konscie adaptos nian nombron al la ebloj, ni kreos la kondiĉojn kiuj igos nin perei kiel la kunikloj, kaj tiel ekvilibro reestabliĝos.

008 : 222.11 (IV, 9).07

## KONFLIKTO INTER CIVILIZOJ; BIBLIA STUDO

far

D-ro Inĝ. G. HAMMING.

> Kaj la Eternulo diris al Kain: Kie estas via frato Habel? Kaj tiu diris: Mi ne scias; ĉu mi estas gardisto de mia frato?
> Genezo 4 : 9

En la nuna tempo la homaro havas kelkajn rimedojn por formi sian mondbildon. Ne hazarde mi diras „homaro" do ne „homoj". Ne nur la homoj pensas kaj sentas, sed ankaŭ la homaro kiel tuto; ĝiaj ideoj formiĝas, flugante de unu menso al alia. La ĉefaj rimedoj, kiujn la homaro uzas por atingi klarecon, estas la scienco kaj la arto. Per la scienco la homaro kontrolas ĉu la estantaj asertoj povas esti veraj; per la arto la homaro serĉas kaj trovas novajn ideojn. La arto ofte sugestas la konceptojn, kiujn la scienco poste kontrolas. Ekz. „La mondo ne havas atendejon" far Maurits Dekker pensigas pri la jura problemo, kiu rajtas pri eltrovaĵoj, ĉu la dungita esploristo ĉu la dunginta ŝtato.

Grava parto el la artaro estas la literaturo. En niaj tagoj plej impone rolas la romanoj kaj noveloj. Iusence tiuj formoj estas pli malpli novaj en la Eŭropa civilizo. Dum la 18a jarcento kaj antaŭe oni apenaŭ aŭ tute ne konis ilin.

Tamen la novelo jam estas tre malnova formo. Mi nur memorigu pri la novelo pri Jona, la profeto kiu rifuzis prediki en Nineve. Li fuĝis trans la maron, sed oni dronigis lin. Feliĉe li eniĝis en stomakon de fiŝego, kiu poste sputegis lin sur la marbordon ktp.



Ĝenerale romanoj kaj noveloj ne pretendas esti science veraj. Ili nur volas sugeste vidigi kelkajn trajtojn de la realo. Nur tiuj specialaj trajtoj devas esti veraj. En la periodo el la okcidenta civilizo kiam oni forgesis tiajn literaturajn formojn, oni povis kredi ke tiaj rakontoj kia tiu pri Jona postulas ankaŭ sciencan kredon. Nun same kiel antaŭ la evoluo de la scienca pensmaniero, oni pli bone komprenas la esencon de la koncernaj literaturaj formoj. Ja la libro pri Jona estas flama protesto kontraŭ la tro naciisma religio de la Juda popolo. Oni povas ŝategi la tendencon de la novelo, kiu havas tre streĉan formon.

Sendube la verkinto de la libro Jona jam sufiĉe distingis inter scienca vero kaj nura tendenco, li sciis ke li verkas nur novelon. Tamen multaj aliaj aŭtoroj tion ne sciis. Ili verkis historiajn romanojn, pli ĝuste: historiajn novelojn. Eĉ por ni estas tre malfacile scii la historiajn okazojn el nia propra epoko. Kiel fakte estiĝis la du grandaj mondaj militoj? Ĉu la komenco estis ĉe iu murdo sur la Balkano; ĉu la komenco jam estis ĉe la disrabo de la kolonioj; ĉu eble alia gravaĵo aŭ malgravaĵo estis la komenco? Same ni konstatu ke Usonanoj ne scias kio okazas en Sovetio, kaj inverse. Tiel ankaŭ en malnovaj tempoj oni apenaŭ sciis la okazaĵojn el sia propra epoko, kaj oni nepre ne sciis la detalojn pri la antaŭaj periodoj, nek la ĉefajn gravaĵojn.

Eĉ se iu scius la faktojn el sia propra tempo li nur rakontus al siaj infanoj tiujn, kiuj lin interesis. Oni ja ne povas memori kaj rakonti senlime. Ankaŭ la idoj kribras laŭ sia gusto. Tiele post cent aŭ ducent jaroj la historiaj rakontoj per sia formo kaj per sia ekzisto spegulas la popolan animon, kaj speciale tiun de la rakontanto.

Nu la plimulto el la malnovaj historiaj rakontoj ekzistadis dum longaj periodoj nur per buŝa tradicio. Oni ja ne povis kontroli ĉu la komenco de iu rakonto estis en iu fabelo ĉu en iu okazaĵo. Eĉ oni apenaŭ serĉis la kontrolon; ĉar oni pli malpli ŝatis la rakontojn kiel ni ŝatas historian romanon, per ĝi ni volas kontentigi nian scivolon kaj samtempe ni volas morale nutri nin.

En nia epoko ni havas la sciencan taskon vidigi la problemojn de la malnovaj popoloj pere de iliaj rakontoj. Ĉi-kaze mi volas esplori la rakonton el Genezo 4 pri la kverelo inter Kain kaj Habel. La ĉefan demandon el la rakonto mi mote metis super la artikolon.

Karakterize por la rakonto estas ke oni indikas Dion per la nomo Jahveh (Eternulo); tio ne okazas ekz. en Genezo 1. Laŭ la nunaj opinioj tiu trajto (kaj kelkaj aliaj) indikas ke la rakonto estas parto el kolekto, kiun oni kunigis ĉirkaŭ la tempo de David. Kredeble la rakonto mem tiam jam estis malnova; ĝi povas veni el la nomada periodo de la Izraelidaj gentoj.

Por kompreni la rakonton oni sciu jenajn faktojn. Sudoriente de Kanaan (la Juda lando) estas la Araba dezerto. En tiu dezerto loĝas nomadaj gregistoj. Ĉirkaŭ la dezerto estas pli fekundaj regionoj (Kanaan, Babelio ktp.). Tie loĝas nenomadaj agristoj, kaj tie formiĝas urboj. La urba civilizo laŭ niaj urbecaj normoj estis pli kultura ol tiu de la gregistoj; sed kio estas krudo, kaj kio estas dekadenco?

Kiel ajn, la nomadaj gregistoj ĉiam estis krudece fortaj kaj konkeradis jen kaj jen la fekundajn terenojn. Post la konkero ili kulturiĝis, alivorte dekadenciĝis; do aliaj gentoj klopodadis konkeri ilin. Unu ekzemplo estas, ke la nomadaj Izraelidaj gentoj konkeris Kanaanon. La konkeroj kiujn iniciatis Mahomet, donas alian ekzemplon de la eterna historio en tiuj regionoj.

Oni vidas ke la diferenco inter gregisto kaj agristo estas tre grava. Laŭ la rakonto pri Kain kaj Habel, Kain estis terlaboristo, agristo; sed Habel estis ŝafpaŝtisto, gregisto. Ambaŭ estis filoj de „ha adam", tradukite: de la homo. „Ha adam" estas nur personiĝo de la tuta homaro; laŭ nia rakonto la homaro dividiĝas laŭ du partoj, jus indikitaj.

En la rakonto Habel estas la simpatia persono, la tradicianto preferas la gregistojn; evidente la historio originas en la nomada periodo. Krome ni atentigu ke la nomo Kain ankaŭ troviĝas en Gen. 15 : 19; la Kainidoj (Kenidoj) formas unu genton en Kanaan. Per „Kain" la nomadaj gregistoj do personigis la agristan loĝantaron de la lando, kiun ili volis posedi. La rakonto devas konstati la moralan rajton.

Eble kelkaj legantoj miros pri la rilato inter Kain kaj Kenidoj. Inter ambaŭ ja estis la granda diluvo. Ili ne forgesu ke ĉiuj rakontoj jam ekzistis, antaŭ kiam oni envicigis ilin en la libro Genezo. La aŭtoroj de Genezo evidente estis scienculoj kiuj malinklinis aliigi la rakontojn, do ili konservis la kontraŭdirojn, kiel problemojn. Tio atestas pri ilia scienca honesto. Laŭ nia nuna scio la envicigo havas nenian sciencan valoron; sed la rakontoj mem restas interesaj.

Nun ni atentu pri la personoj. Kain estas la unua naskita, pri kiu la homaro (buŝe de Eva) fieras: Kain estas homo de la Eternulo. Pri Habel la rakonto ne mencias tiajn detalojn. Cetere la nomo Habel signifas „spirblovo, neniaĵo". Evidente la nomadoj havis senton de malvaloreco antaŭ la nenomadaj agristoj. Kompense al tiu sento ili estis certaj ke Dio ne akceptas la rezultojn de la nenomada dekadenca civilizo; nur la produktojn de la gregista kulturo oni povas sukcese oferi al Dio. Ĝuste pro la pekoj de la Kanaananoj Dio donis ilian landon al la Izraelidoj.

Sed kio estas la peko de la fiksloĝantoj? Nia rakonto diras ke ili murdas la nomadojn, ĉar ili ne ŝatas la purecon de ties kulturo. Ni volas vidi, ĉu tiu riproĉo povas esti prava. Por tio ni konsideru la malnovajn sistemojn por perlabori la vivrimedojn.

La plej malnova sistemo estas la prena perlaboro. La ĉasistoj kaj aliaj kolektistoj prenas la nutraĵon el la naturo por tuja uzo. Pli novaj sistemoj ekspluatas ian posedaĵon. La gregistoj posedas gregojn por ekspluatado. Ili posedas la bestojn, ĉar kaj dum ili defendas ilin. Kompreneble en tia situacio povas estiĝi la koncepto de *rajto* al la brutaro. Dum la tempo, kiam tiu nocio fariĝadis estis multaj ebloj por konfliktoj. Ja la prenistoj laŭ siaj normoj rajtis preni ĉiun beston; sed laŭ la gregistoj tiu preno estas rabo, se ili pretendis ke la besto estas ilia posedaĵo. Nu, nia rakonto ne temas pri ĉi tiu konflikto.



Tamen poste estiĝis simila konflikto. Koncerne la grundo la gregisto estas prenisto, nur koncerne la brutaro li estas ekspluatisto. Sed nun ekvenas homoj kiuj volas ekspluati la grundon, ili estas la agristoj. Certe estis tempo, kiam la agristoj prenis pli kaj pli da terpecoj, kie antaŭe la gregistoj paŝtis siajn brutarojn. Tiel la agristoj forpelis la gregistojn. Ni konas la situacion ĉar ankaŭ en la lastaj jarcentoj okazis samaĵoj. Nu, la gregistoj opiniis ke la agristoj rabas kaj rabe tenas la paŝtejojn, kaj la agristoj plendis ke la gregistoj rabas kaj rabadas iliajn rikoltojn. Ambaŭ vidpunktoj estas kompreneblaj. Kion ni do juĝu pri la konflikto?

Antaŭ juĝi ni volas formuli la problemon per modernaj nocioj: Ekzistas intensivaj kaj malintensivaj civilizoj. La intensivaj sistemoj ebligas pli grandan loĝdenson ol la malintensivaj. La agrista sistemo estas pli intensiva ol la gregista sistemo. Laŭ la anoj de intensiva civilizo, ilia civilizo estas pli delikata ol tiu de la malintensivuloj.

La problemo estas, ĉu la intensivuloj rajtas ebligi sian delikatan civilizon devigante aliulojn adaptiĝi al la intensiva civilizo. Nia rakonto neas, kaj nomas la sintenon de la intensivuloj murdo. Nia rakonto diras ke tia delikata civilizo estas naŭzaĵo antaŭ Dio.

Multaj Biblianoj scias ke Gen. 1 : 28 tekstas: Kaj Dio benis ilin (la homojn), kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron ...... Kelkaj el la Biblianoj malatentis ke ĉi teksto ne diras, kiukaze la tero estas plenigita.

Evidente Gen. 4 donas la difinon. Iu terparto estas tro plena se la tiea loĝdenso estas tia, ke la loĝantoj volas trudi sian perlaboran sistemon kaj sian civilizon al aliuloj. Se iu civilizo pro sia naskiĝsaldo prenas parton de la ekonomia bazo de alia civilizo, ĝi murdadas. Tiu sentenco validas por popoloj kaj por eklezioj, ja por ĉiuj civilizaj unuoj. Jen la vidpunkto el Genezo.

Ĉu ĝi estas prava? Kompreneble ni ne povas akcepti iun starpunkton aŭtomate, kaj apliki ĝin al nia socio. Post kiam tiu rakonto estiĝis, pasis pli ol trimil jaroj. Estus strange se dume la koncernaj ideoj tute ne progresis.

Kiam ni pensas pri la nuna konflikto inter la civilizoj de la mondo ni ne forgesu, ke la intensivaj civilizoj ankaŭ kreis efikajn higienon kaj medicinon. Se oni volas konservi aliajn civilizojn, oni ne sendu al ili niajn kuracistojn kaj sanigilojn. Ĉar ankaŭ tiuj detruas malnovajn ekonomiajn ekvilibrojn.

Ĉu ni prefere konservu la vivojn aŭ la konceptojn de malmodernaj popoloj? Jen grava problemo. Sed ne estas problemo, ĉu la delikataj modernaj civilizoj hontu, ĉar ili malkvietigas ĉiun popolon en kies lando troviĝas varo por la mondmerkato.

Laŭ Okcidenta agnosko la negroj ne havas la rajton lasi la utilaĵojn en sia tero. La negroj ne posedas sian landon, ĉar la mondekonomio postulas ke la Afrikaj trezoroj ekspluatiĝu en la nuna jarcento. Sed se la Afrikanoj ne havas la rajton, kial la Usonanoj jes havas ĝin? Kial ili rajtas limigi la nombron da enmigrontoj. Ĉu ili jes posedas la grundon? Estas konate ke ili rabis ĝin, ĉar ili preskaŭ ekstermis la Indianojn, prenante ilian vivobazon; ĉu tio donas posedrajton?

Krome estas konate, ke la grundo nutras grandan parton el la Eŭropanoj kaj eble Azianoj. Tamen la nutratoj ne rajtas flegi la grundon, kiu eroziiĝas. Usono ne enlasas ilin, kvankam ĝi havas la plej riĉan civilizon. Kompreneble la aferoj nun nur bone marŝas, se Usono donacas la nutraĵojn al la mal-akceptataj manĝantoj.

Verŝajne estas granda feliĉo por la mondo, ke Usono ne enlasas fremd-ulojn grandkvante. La evoluon de la monda civilizo tio malhelpus. Sed ĉi tio estas nur argumento el la oportuno. Por la paciĝo de la mondo estas necese, science klarigi ĉu Usono havas rajton al sia grundo.

Laŭ mia opinio la nuna helpo far Usono al la cetera mondo estas pun-mono, kiun ĝi pagas dum ĝi ankoraŭ ne solvis la problemon. Mi estas dankega ke ĝi tion faras; oni ja povas esti danka se iu ĝustatempe komprenas sian devon.

130.2 : {3 + 6}

## NIA HEREDAĴO

de EDGAR J. SAXON.

(El la gazeto *„ABUNDANCE: A Herald of the Age of Plenty"* por Julio, Aŭgusto, Septembro, 1950, la organo de la *„Social Credit Co-ordinating Centre"*, tradukis T.L.C.B.).

Oni ofte diras, ke la moderna scienco rabis de ni la misteron kaj la miro-kapablon. Se tio estas vera, kulpas ni. La grandega panoramo en tempo kaj en spaco, kiun nuntempe prezentas al la menso la geologio, fiziko, astronomio, biologio kaj antropologio povas esti, kaj certe ja devus esti profunda stimulo al la pensado kaj al la imago.

Ekzemple: jam estas evidente, ke ĉiu homa generacio ricevas heredon, kiu estas nepriskribeble profunda kaj riĉa; sed ĝi estas heredo, kiun oni nuntempe malŝparas kun terura rapideco. Tia estas nia homa naturo, ke ĝi lernas nur tre malrapide. Sub la ondoj de la progresanta scio troviĝas subrefluo de mensa maldiligento. En diversaj epokoj de la pasinteco la homaj civilizoj faris plu-rajn el niaj eraregoj, kaj por ili oni povas trovi ian senkulpigon, ĉar ili sciis tiom malpli pri la antaŭhoma pasinteco de nia planedo, tiom malpli pri la komplikita strukturo de inter-rilateco, kiu kuntenas en unu sola vivanta kun-figuraĵo la polvon de la rokoj, bakteriojn, lumbrikojn, kreskaĵojn, bestojn, aeron, lumon kaj akvon. Ĉiam troviĝis kelkaj individuoj, kiuj intuicie per-ceptis la homan prirespondecon pri la „donitaĵoj" — la grundo, la riveroj, la arboj, — de kiuj dependas la homa ekzisto. Sed kvankam la intuicio kaj la pieco ĉe ni nuntempe malmulte abundas, la stimuloj al ili, kompare kun tiuj, kiuj ekzistis antaŭ eble 2000 jaroj, estas kvazaŭ superbordiĝanta riverego kompare kun rivereto.

La heredo, pri kiu mi parolas, ne estas sole, — ĝi ne estas eĉ ĉefe — la amasigitaj lertoj kaj teknika scio de civilizitaj popoloj, kvankam tiuj ja



estas mirindaj. Kontraŭ la fono de la antaŭ-homa kaj sub-homa historio, tiuj estas nur hieraŭaĵoj. La unuaj homoj, kiuj uzis akre-tranĉan silik-ŝtonon kiel ilon, heredis la saman suprajan grundon, la samajn rokojn, la samajn lumon kaj aeron kaj akvon, kiel ni mem. Ili ne povis malŝpari tiun heredon, ĉar ili ne sufiĉe sciis. Sed ni lernis, kiel utiligi ĉion. Ni multe similas al la pli juna filo, kiu, avide dezirante „sperti la vivon", petis antaŭe „la heredotan parton de la havo", kaj ricevis ĝin, kaj post periodo de forta ekscito „revenis al si", post kiam li „disperdis sian havon". (Luko 15/12 k.c.).

Al nuntempaj aŭdantoj, kiel ankaŭ al tiuj, kiuj aŭdis la parabolon en Pa-lestino, kiam ĝi estis unuafoje rakontata, kaj eĉ al homoj el tempoj pli fruaj, la historio ĉefe sugestus la perdon de mono. Li estis ricevinta de sia patro la monon, kaj ĝin jam elspezis. Sed la brila lumo kiu estas la percepto Soci-kredita, interpretas ĉi tiun belegan historion rilate al la vera riĉo kaj ĝia perdo.

Ĉiu eldono de numero de la jurnalo *New York Times* — 92 paĝoj kune kun suplementoj — bezonas por la papero, sur kiu ĝi presiĝas, 40 hektarojn da arbaraj arboj. La legantoj ne vidas la falon de la arbaroj en grandegaj falĉaĵoj. La paper-fabrikistoj nur aĉetas la pulpolignon de aliaj firmoj, kiuj sin okupas pri la rikoltado de tio, kion ili ne faris.

En Anglujo ĉiujare la perakva sanitarigo forportas ĉirkaŭ 300 000 tunojn de la tri ĉefaj kemiaj elementoj devenintaj el la grundo, en kloakaĵo en la maron; por Eŭropo entute la kvanto estas ĉirkaŭ 20 milionoj da tunoj.

La maldika supraja grundo de vastaj areoj de Aŭstraliaj ŝaf-bienoj for-bloviĝas de tempo al tempo tiel pogrande, ke ĝi pensigas pri apokalipsaĵo.

La lasta tiuspeca katastrofo vidiĝis super la Pacifika oceano 1000 km for de la marbordo, kiel densa nubo da ruĝa polvo 2,4 km alta kaj 650 km longa. Tio estis supraja grundo, kiu subtenas la vivon.

Tiaj raboj, tiaj malŝparoj, tiaj katastrofoj ne estas en la sama kategorio, kiel tertremoj aŭ sismaj marondegoj. Ili estas la neeviteblaj rezultoj de miopaj, senimagaj, komercemaj kaj higienaj civilizoj. Ja la higieno igas la homojn timemaj pri la mikroboj kaj neŭrozaj antaŭ la sterko. La unuflanke-fake scienca menso entreprenas kulturi arakidojn en Tanganjiko, kvazaŭ temus nur pri teren-ebenigiloj kaj komercaj rikoltoj. La menso konfuzita per mon-avido postulas ĉiam pli grandajn kvantojn da papero, kaj forgesas, el kio la papero estas fabrikita, kaj ne scias, ke arbaregoj kaj arbaroj kaj eĉ heĝoj estas ĉiuj nepre necesaj por la konservado de la produktokapablo de la grun-do, kaj de la akvo-proviza sistemo de la grund-suprajoj de nia tero.

Kiu per siaj propraj manoj, kaj metiiste atentante ĉiun detalon, ŝanĝis ĉiujn organikajn forjetaĵojn de sia propra domo kaj ĝardeno al fekunda su-praja grundo, permesante la nenombreblan loĝantaron de bakterioj, kaj la viglajn kaj laboremajn lumbrikojn fari la laboron, kiun ili instinkte faras en la tuta sistemo de la mondo, tiu post tio neniam povos havi la menson de paper-komercisto, pensmanieron por kiu ĉefas la malinfektiloj, dissplititan perspek-tivon.